

'Antikva Feminista Manuskripto trovita en Ĉinio'

Agence France Press:

AFP raportas: Ancient feminist script found in China
Publikigita en *Star Tribune (Mineapolis, MN) May 18, 1986, p28A*

Antaŭvorto

Ĉe la redaktado de artikolo pri Huang-di Nei Jing (publikigita en kajero 1999(2)-177) mi trovis citaĵon de *AFP* pri arkaika ĉina lingvaĵo devenanta el matriarkece organizita tempo.

Pere de la biblioteko de la Federacia Teknika Altlernejo (ETH, Zürich, CH) tiu artikolo estis trovebla per telepruntepreno *interbibl@library*. Mi dankas al s-ino E. Lupart-Gasser pro ŝia helpo. Jen la esperantlingva traduko. (R. Hauger).

Ĉina lingvisto eltrovis grupon de maljunaj virinoj, kiuj uzas antikvan skribsistemon 'nur por virinoj', pri kiu oni supozas, ke ĝi retrodatumas pli ol du mil jarojn, laŭ *China Daily*.

Tiu skribo, skribata kaj legata nur de virinoj, uzas alie aranĝitan gramatikan kaj sintaksan sistemon, tre diferenca de la ĉina, kaj similas al la orakoloj de la Shang Dinastio (1600-1000 antaŭ nia erao) enranĉetitaj en ostoj, kaj ankau al la skribsignoj de la Qin Dinastio (221-206) - laŭ la raporto de la ĵurnalo.

Manpleno de pli maljunaj virinoj, kiuj kapablas legi kaj skribi la antikvaj skribsignojn, estis trovitaj de esploristoj en 1982 enmeze de malfacile alirebla regiono de la centra provinco Hunan. Ili determinis, ke la skribo estis uzata por notoj pri religio, spektakloj, korespondaĵoj, historiaj rilatoj kaj pri aliaj sociaj kontekstoj.

Virinoj el tiu regiono kredas, ke la menciita skribo, kiun patrinoj instruis hejme al siaj filinoj, estis inventita de Hu Xiuying, konkubino en la Song Dinastio (960-1270) por plifaciligi la izolecon. Ili kredas, ke ŝiaj skribaĵoj pli malfrue estis realportitaj al Jiangyong, ŝia hejmurbo en Hunan, kie la skribo ankoraŭ estas uzata.

Sed profesoro Gong Zhibing, aŭtoro de libro pri tiu skribo publikigota venontan monaton opinias, ke la lingvo estas tro kompleksa por esti kreaĵo de unuopa persono, kaj li supozas, ke ĝi estas restaĵo de skribsistemo, kiun oni povus konjekti perdiĝinta kiam Qinshi Huangdi, la unua imperiestro, en 221 a. n. e. unuigis Ĉinion*.

Qinshi metis la bazojn por unuecigita ĉina skribo malpermesinte la uzon de ĉiuj normigitaj lingvaj skribaĵoj escepte de siaj oficialaj malvastemaj kaj reduktitaj skribsignoj.

Estis citate ke laŭ diro de Gong virinoj, kiuj estis ekskluditaj de la studadoj ekster la domo, laŭgrade faris la pli fruajn skribitajn formojn siaj propraj.

La plej multaj manuskriptoj apartenas al kvar kategorioj: poezio, autobiografio, leteroj kaj kantoj, dum malgranda nombro de historiaj skribaĵoj okupiĝas pri la 19jarcenta Taiping-ribeo**, pri la japana invado en la 1930aj jaroj kaj pri la liberigo far la komunistoj en 1949.

Junaj knabinoj en Jiangyong laŭdire formis 'konspiro-fratinajn' unuiĝojn uzante la skribon por dokumenti siajn interligojn kaj por korespondi unu kun la aliaj eĉ longe post sia plenkreskeco kaj edziĝo.

Nur malmultaj el la skribaĵoj transkonserviĝis, ĉar la virinoj elpetis, ke ĉiuj iliaj skribaĵoj estu forbruligataj, kiam ili estas mortintaj, por ke ili povu legi siajn ŝatverkojn en la postmorta vivo.

Dum sia serĉesploro en Jianyong renkontis Gong la 85jara Gao Yinxian kaj la 80jara Yin Nianhui, kiuj ambau estis ankoraŭ kapablaj legi kaj skribi la lingvaĵon kaj kiuj sukcese retenis 12 ekzemplerojn de la skribaĵoj.

La du virinoj, la solaj transvivantaj membroj de sepkapa konspiro-fratina 'familio' estis forbrulintaj ĉiujn skribitajn partojn de tria fratino, kiam ŝi mortis en tiu ĉi jaro - kiel la raporto sciigas.

*) Qinshi Huangdi strikte forbruligis ĉiujn dokumentojn kaj tekstojn skribitajn en pli fruaj skribsistemoj.

***) Taiping ('granda paco') estis ribela kuniĝo de 1850 (Kwangsi) ĝis 1865 (Nanking), ankau kontraŭ la Mandŝu-Dinastio. (rh)